

Nocte surgentes

Brevier-Himno

Ordinara tempo > 2-a kaj 4-a semajno > mardo > horo de la legaĵoj > nokte

*Nocte surgentes vigilemus omnes,
semper in psalmis meditemur atque
viribus totis Domino canamus
dulciter hymnos,*

*Ut, pio regi pariter canentes,
cum suis sanctis mereamur aulam
ingredi caeli, simul et beatam
ducere vitam.*

*Præstet hoc nobis Deitas beata
Patris ac Nati, pariterque Sancti
Spiritus, cuius resonat per omnem
gloria mundum.*

Amen.

latina T: 8-a jarcento

En nokta horo vigle ni leviĝu,
de l' brevier' la psalmojn ni meditu,
per ĉiuj fortoj ni al Dio kantu
dolĉe la himnojn.

Ke ni meritu, kiel reĝa ĥoro,
kante eniri la ĉielan halon
kun la sanktuloj, por eterne vivi
vivon beatan.

Tion donacu Vi, beata Dio,
Patro kaj Filo kaj Spirito Sankta,
al kies laŭdo eĥas tra la mondo
kantoj de gloro.

Amen.

E: Peter Langenecker kaj Albrecht Kronenberger 2005,
3-a strofo parte laŭ Guido Holz en ADORU 091